

ĉeĥa	<i>výška sestavy</i>	hungara	<i>rendszermagasság</i>
dana	<i>systemhøjde</i>	itala	<i>altezza di sistema</i>
franca	<i>encombrement du la caténaire</i>	pola	<i>wysokość konstrukcyjna</i>
germana	<i>Systemhöhe</i>	rumana	<i>Înălțimea de sistem constructiv</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „distanco inter kontaktodrato kaj portkablo ĉe suspensiopunkto” (jam traktita en TeKu 96) estas preskaŭ la difino, vere tro longa.

Jen tri terminŝanĝaj proponoj: **1) katenaria alto**  
**2) katenaria sistemalto**  
**3) katenaria konstruckia alto**

**12750** Aparato ĉe trako, kiu transsendas datumojn al trajno, por aktualigi la aŭtomatajn sekurecinstalaĵojn ĉe veturiloj koncerne trak- kaj signalilkondiĉojn sur la sekvanta liniosekcio.

angla	<i>track antenna; beacon; balise</i>
franca	<i>balise</i>
germana	<i>Balise; Gleisantenne; Gleisbake</i>

Du terminproponoj: **1) trakanteno (Balizo)**  
**2) trakanteno „Balizo”**

Noto: El la solvo 1) rezultus en *RailLexic*: termino: **trakanteno** noto: **Balizo**  
 El la solvo 2) rezultus en *RailLexic*: termino: **trakanteno „Balizo”**

**12751** Trakanteno ne daŭre transsendanta datumojn, sed demandata per surveturanta trajno, por transsendi datumojn al aŭtomata trajnsekuriga sistemo.

germana *Gleiskoppelspule*

Unu terminpropono: **trakanteno pasiva**

**12752** Trakanteno daŭre transsendanta datumojn.

germana *aktive Balise*

Unu terminpropono: **trakanteno aktiva**



Fine de la fakaj traktoj mi elkore deziras al vi kaj viaj familianoj agrablajn festotagojn kaj kontentigan sanon. Kvankam espero pri tutmonda paco dum la nova jaro estas preskaŭ utopia, ĉiu klopodu iom kontribui laŭ siaj ebloj por paca kunvivado sen malamo kaj venĝo.

Heinz Hoffmann

## Terminara Kuriero

TeKu 135

Decembro 2008

### Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingor  
 Telefono: +45 49 261319 Retadreso: niemann@kabelmail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul  
 Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: Hoffmann-IFEF@cablemail.de

#### Karaj gekolegoj,

kontribuojn al TeKu 134 sendis niaj fidelaj aktivuloj *Zdeněk Polák, Zlatko Hinšt, Erik Mortensen, Henning Olsen* kaj *Jan Niemann*. Ili meritas nian sinceran dankon.

#### Jen la elekta rezulto:

**11477** Ĉiuj kontentas pri la solvo **rapidoreguligo**.

**11478** *Zdeněk Polák* pledas por la ĝisnuna termino **rapidoregado**, *Zlatko Hinšt* preferas la solvon **rapidoregadmetodo**, kaj la dana grupo elektis la terminon **rapidoreguligmetodo**. Sekve necesas diskuto en Triesto.

**12724** Ĉiuj elektis la duan solvon **transformilo rektabula (komputila regejo)**.

**12736** Pri konservo de la ĝisnuna termino **horarprocesoro** estas ĝenerala konsento, kvankam *Zlatko Hinšt* preferus la duan solvon, se aliaj terminoj kun „optimumigo” estus troveblaj.

**12740** *Zdeněk Polák* kaj la dana grupo preferas la trian solvon **bariero tutbara**, *Zlatko Hinšt* la duan solvon **bariero totalbara**. En Triesto ni decidis pri la termino.

**12750** La problemekspliko troviĝas jam sur paĝo 2 de TeKu 134. La nova propono **trakbalizo** de *Zlatko Hinšt* ankoraŭ enhavas la ĝis nun ne akceptitan neologismon. La dana grupo montris artifikan solvon, nome kombino de la termino **trakanteno** kun propra Esperantonomo **Balizo** (majuskla komenclitero kaj ofinaĵo). Tiukaze ne necesus konfirmo fare de PIV-redaktejo! La elekto de la litero z (anstataŭ s) avantaĝas pro belsonco, kaj respondas ekzemple al la kroata termino „baliza”. Bonvole elektu formon laŭ la proponoj sur paĝo 4 de ĉi tiu TeKu.



## Jen kelkaj novaj taskoj:

**00076** Rapida plenigo de bremsaera ĉefkondukotubo per nestringata premaero el ĉefaerujo, super regula pretecpremo.

ĉeĥa	<i>plnicí švih</i>	itala	<i>colpo brusco di riempimento</i>
dana	<i>fyldestød</i>	pola	<i>impuls uderzeniowy napelniania</i>
franca	<i>à-coup de remplissage</i>	rumana	<i>șoc de umplere</i>
germana	<i>Füllstoß</i>	serba	<i>udar visokog pritiska (končica)</i>
hungara	<i>töltőhullám</i>		

La ĝisnuna Esperanto-termino „ekpuŝo ĉe bremsoplenigo” gramatike ne estas ekzakta, ĉar laŭ PIV ĉiu puŝo estas eka. Jen du terminŝanĝaj proponoj:

**1) puŝo ĉe bremsoplenigo**

**2) bremsotubplenigo forte ekprema**

PIV klarigas: **puŝo 1** Forta ekpremo, kiu delokigas.

**02450** Proporcio inter fakta kaj plena enhavoj en laborspaco de hidrodinamika sistemo.

ĉeĥa	<i>stupeň plnění</i>	itala	<i>grado di ammissione</i>
dana	<i>fyltningsgrad</i>	pola	<i>stopień napelnienia</i>
franca	<i>degré d'admission</i>	rumana	<i>grad de admisie</i>
germana	<i>Füllungsgrad</i>	serba	<i>stepen punjenja</i>
hungara	<i>töltésfok</i>		


Du terminproponoj: **1) enlasgrado** = ĝisnuna termino

**2) plenigogrado**

**02695** Duobla distanco inter geometria mezo de radakso kaj tuŝpunkto rado / relo.

ĉeĥa	<i>průměr styčné kružnice</i>
dana	<i>løbefladediameter</i>
franca	<i>diamètre du cercle de roulement</i>
germana	<i>Laufkreisdurchmesser</i>
hungara	<i>futókör átmérő</i>
itala	<i>diametro del cerchione di rotolamento</i>
pola	<i>średnica okręgu tocznego</i>
rumana	<i>diametru al cercului de rulare</i>
serba	<i>prečnik kruga kotrljana</i>

La ĝisnuna Esperanto-termino „diametro rulcirkla” ne estas ekzakta, ĉar la tuta rado ruliĝas. Jen unu terminŝanĝa propono: **radodiametro reltuŝa**



**03822** Parto de magneta flukso, kiu devojiĝas, sekve ne estas disponebla por energikreado.

ĉeĥa	<i>rozptylový tok</i>	itala	<i>flusso di dispersione</i>
dana	<i>fluxtab</i>	pola	<i>strumień rozproszenia</i>
franca	<i>flux de fuite</i>	rumana	<i>flux de dispersie</i>
germana	<i>Streufloss</i>	serba	<i>razlivanje</i>
hungara	<i>szórásí fluxus</i>		

Tri terminproponoj: **1) flukso disiĝa** = ĝisnuna termino  
**2) flukso dispersa** = ĝisnuna termino  
**3) flukso devojiĝa**

PIV klarigas: **dispersi 2** (kemio) Disdividi substancon en medion, ĝis ricevo de homogena aŭ homogenaspekta maso.

**08824** Ĉasioparto ĉefe de varvagonoj, por pli da firmeco kaj rigideco de la ĉasiosparo.

ĉeĥa	<i>výztuž podélníku</i>
dana	<i>længdedragerforstærkning</i>
franca	<i>tirant de brancard</i>
germana	<i>Sprengwerk</i>
hungara	<i>feszítőmű</i>
itala	<i>armatura di rinforzo del longherone</i>
pola	<i>podciąg ostojnicy</i>
rumana	<i>armătură de longeron</i>
serba	<i>pojačanje uzdučnog nosača</i>



La ĝisnuna Esperanto-termino „stajostango” ne estas ekzakta, ĉar moderna trapezforma ĉasioparto (vidu la supran bildon) ne konsistas el stangoj, kaj ĉar PIV klarigas: **stajo** Ŝtala dratego, subtenanta foston de lineo aŭ antenan maston kontraŭ laŭlongaj aŭ transversaj fleksofortoj. Stajo efikas per tirado.

Jen du terminŝanĝaj proponoj: **1) ĉasiorigidigajo**

**2) ĉasioŝtego**

PIV klarigas: **stego** Peco, kiu kunligas du flankojn de objekto, du metalajn platojn kaj simile, por plifortigi ilin, fiksi ilin en nevaria pozicio aŭ rezervi interspacon inter ili. Stego precipe kontraŭstaras fortojn, kiuj misformas la objekton.

**10341** Vertikala distanco inter la ĉefa portkablo kaj kontaktodrato ĉe suspensiopunkto.

